

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

REDAKTATA DE LÉON CHAMPY, FR. SCHOOFS,
VAN DER BIEST-ANDELHOF, JER. VAN LAERE,
KAJ OSCAR VANSCHOOR.

ABONPREZO :

Belglando Fr. 4. — (Sm. 1.50)
Eksterlando Fr. 4.50 (Sm. 1.80)
Unu numero Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beer-
straat, (rue de la Petite Ourse),
Antwerpen-Anvers.

Abonoj kaj Mensejoj : 20, Von-
delstraat, (rue Vondel), id.


Ĵurnaloj, broŝuroj, libroj : 26,
Arendstraat, (rue de l'Aigle)id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio kon-
servas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*



Pro manko de loko ni devas prokrasti la
enpreson de diversaj artikoloj.

1908-1909.



A jaro 1908 estis kaj restos memorinda en la historio de
Esperanto en Belgujo.

Bedaŭrinda malkonsento ekzistis de kelka tempo en
nia tendaro sekve de la agadoj de tiuj, kiuj preteksante
plibonigi Esperanton kaj solvi tiamaniere la demandon pri la
lingvo internacia, pravis anstataŭi ĝin per plagiato de tiu ĉi, kaj ri-
fuzis sian fidon al nia kara Majstro, al la Lingva Komitato kaj ĝia
Akademio.

Tiuj renadoj nur naskis momentan dubon kaj haltigon de la
propagando, kaj baldaŭ oni vidis ke la grava plimulto de la Bel-

gaj esperantistoj ne konsentas forlasi la Zamenhofan Esperanton aŭ malfidi la aŭtoritatojn kies tasko estas kontroli la evolucian de nia lingvo.

La ĝenerala kunveno de la Belga Ligo Esperantista, okazinta la 20^{an} de Septembro 1908, klare montris la volon de niaj samideanoj kaj sankciis ĝin per solena deklaro pri fideleco kaj fido.

Certe, ni bedaŭras la defalon de tiuj, kun kiuj ni de kelkaj jaroj fervore kaj simpatie laboris por la triumfo de la lingvo internacia kiu, laŭ ĉiam akceptita interkonsento kaj laŭ la regularo de la Ligo, ne estas alia ol Esperanto. Sed aliparte estas konsolanta kompenso konstatita ke la granda amaso restas kun ni, kaj ĝojigi pri la aliĝo de multe da novaj samideanoj, kiuj plenigas la forlasitajn vicojn. Ĉie renaskiĝas fido, laboro, sukcesplena propaganda agado!

La Belga Ligo Esperantista, kiu kalkulis 14 grupojn antaŭ la okazinta skismo, nun enhavas 17 aliĝintajn societojn.

« Belga Esperantisto » aperis, kaj ricevis la aprobon kaj la apogon de multe da Belgaj kaj eksterlandaj samideanoj.

For estas la tempo de senfinaj, malefikaj diskutoj kaj de malpaco! Saluton al la periodo de unuiĝo, de laboro, de propagando!

La jaro 1909 favore en nia lando aŭguras por Esperanto: bonvenon al ĝi!

B. E.



En nian unuan numeron glitis kelkaj eraroj.

Ĉirkonstancoj, nedependaj de la Redakcio, igis ĝin rapidi kaj malhelpis al ĝi suliĉe zorge korekti la presprovajojn.



INTERKONSENTO



ESPERANTO estas nun vivanta lingvo. Do kiel ĉiu vivanta organizajo, Esperanto havas sian iom-post-ioman naturan evolucian. Perforti tiun evolucian per grava ŝko, estus mortigi la ĉie triumfantan ideon de la internacia lingvo.

Ĉar lingvo internacia ne estas maŝino!

Imagu maŝinon por fabriki alumetojn. En jam 200 fabrikejoj de la mondo oni uzas ĝin. Progresemluloj estas kompreneble tiuj inĝenieroj, kiuj klopodas por perfektigi tiun maŝinon, t. e. por igi ĝin produkti pli da alumetoj kaj pli malmultekoste. Post kelkaj jaroj

unu el la plibonigitaj maŝinoj, ekzemple en Germanlando, jam produktas la trioblon; alia, en Usono, ankaŭ. Tamen, ambaŭ maŝinoj ne similas plu je la originala tipo; pli mirinde! la Usona kaj la Germana maŝinoj estas ĝintaj eĉ tute malsamaj. Nu, tiu malsameco estas negrava afero por la industrio: produkti estas tie ĉi la celo.

Rilate al lingvo nacia aŭ internacia, interkompreni estas la celo. Male je supra ekzemplo pri maŝino, la plej logikaj, la plej bonaj ŝanĝoj proponataj en ĉiu lingvo, estas senvaloraj, se ili ne estas samtempe aprobatataj kaj akceptataj de la tuta lingvanaro; senĉese, obstine farate, kaj ĉiufoje nur de kelkaj personoj akceptate, tiaj ŝanĝoj rekte kondukas al la Babela turo. Do, nur per nia ĝenerala interkonsento la internacia lingvo ŝanĝiĝos.

* * *

Senfinaj diskutoj disŝiris kelkajn Esperantistajn grupojn: la Pariza Delegacio estis ekvovinta, ke Esperanto ne estas perfekteca....

De tiu momento kelkaj malkontentuloj kriadis: Jen! ni diris tion ankaŭ! — Kaj, forgesante la mil neperfektaĵojn de naciaj kaj eĉ de falintaj internaciaj lingvoj, ili senkore atakis la mirindan kreitaĵon de nia respektinda majstro, kiu... — pri tio ili neniel atentis! — de la komenco modeste konfesis, ke vere Esperanto estas perfektegebla, kiu neniam diris la malon! (Vidu la « Fundamento de Esperanto. »)

Oni penis plibonigi, oni prezentis alian lingvon.

Nu, se pro neperfekteco oni forlasus lingvan sistemon jam uzatan de pli ol cent mil personoj, por poste provi enkonduki alian sistemon (ankaŭ ne perfektan!) uzotan de aliaj miloj da personoj, la vera tutmonda lingvo neniam ekzistus: ĉar oni eterne povos plibonigi.

* * *

Interkonsento! tio estas la morala fundamento de internacia lingvo, kaj la veraj progresemluloj estas tiuj, kiuj deziras plibonigi Esperanton, atentante precipe pri la organizo kaj la konservo de tiu interkonsento.

Por efektiviĝi tian progreson, ni havas ĉion bezonan. Kaj tion tre bone komprenis la fidelaj Belgaj Esperantistoj, kiam ili voĉdonis la kongreson de la 20^a de Septembro lasta. (Vidu Nojn 1-2 de B. E. paĝo 117.)

Cu ne la jena propono estis unuvoĉe akceptita de la Dresdena Kongreso!

La tasko de la Lingva Komitato estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucian. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la ŝuprediktataj principoj. Neniel la Fundamento, nek la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili kontrolas, certigas.

Por forigi la malutilojn de la grandnombreco de la L. K., oni elektis el ĝi Superan Komision aŭ Akademion enhavantan 18 membrojn. El tiuj ni nur citu Boirac, Bein, Cart, Grabowski, Moch, Sausure, Nylen, Mybs, Villanueva k. t. p., kiuj ĉiuj estas fidelaj Esperantistoj kaj fidindaj kompetentuloj.

En la fino de sia fama raporto, S^o K. Bein esprimas la deziron, ke la tuta Esperantistaro helpadu la L. K. *La celo de ĉi tiu artikolo estas la baldaŭa efektiviĝo de tiu deziro, per simpla kaj praktika organizo de tiu helpado.*

Fidelaj ni estas, neprogresemaĵoj neniel ! Tial ni volas garantii la regulan evolucian de Esperanto, dum kelkaj malfideluloj elpensas eble multegon da novaj lingvaj sistemoj. (En iu urbo, areto da malfideluloj jam propagandas tri malsamajn sistemojn ; ĝoje ni antaŭvidas la tempon, kiam ĉiu el tiuj ŝanĝemuloj havos specialan internacian lingvon.... por sia persona uzado !)

* * *

1^o Antaŭ ĉio, ni forigu la diskuton pri lingvaj demandoj el ĉiu grupa kunveno. La sperto pruvis sufiĉe, ke tiaj olte enuigaj diskutoj nur efikis ke la plejmulto da nekompetentuloj blindesekvis malmultajn sed laboremajn personojn, kiuj interese studis la aferojn. *La grupoj celu nur la propagandon* por Esperanto per paroladoj, kursoj, festoj, ekskursoj, k. t. p.

2^o En ĉiu nacia Esperantista ligo, oni starigu konstantan *Lingvan Komision*, ekzemple el 3 aŭ 4 membroj.

3^o Per la ĵurnalo de la ligo, per ĉiu nacia Esperanta ĵurnalo, la Lingva Komisiono invitu la Esperantistojn kiuj interesas sin kaj studas pri lingvaj temoj, *konigi al ĝi ĉiun ŝanĝon*, kiun ili dezirus enkonduki en la lingvon.

4^o Post kelkaj monatoj, postricevo de multaj leteroj la *Lingva Komisiono ordigu la ricevitaĵajn proponojn*. Ĝi (la Komisiono) diskutu neniel, ĝi nur kunigu la samajn reformojn, ĝi sumigu kaj faru raporton pri sia laboro.

SPECIMENO DE RAPORTO.

La (Belga, Germana, Franca, Angla aŭ alia) Lingva Komisiono ricevis entute 188 prilingvajn leterojn :

a) 179 Esperantistoj postulas la forigon de la akuzativa finiĝo *u* kiu nun esprimas la direkton ;

b) 75 leteroj postulas la reguligon de la vortaro laŭ la fundamentaj principoj kaj pritraktas la aldonon de novaj aliksoj : broso = brosililo, ferigi = ferizi, k. t. p.

c) 43 leteroj deziras la forigon de la supersignaj leteroj ;

d) 14, la forigon de la multenombrea finiĝo *j* ;

e) 4 demandas fiksan vortordon, k. t. p.

5^o Ĉiuj ĉi naciaj raportoj estu sendataj al la Esperanta Akademio, kiu siavice faru ĝeneralan raporton, informantan ankaŭ pri la nacieco de la postulantoj, kaj sendotan al la membroj de la Lingva Komitato, por ke ili sciigu kaj studu pri la deziroj de la tutmonda Esperantistaro.

Same kiel pri nia 4^a propono, ni antaŭvidas ekzemple jenan specimenon de

ĜENERALA RAPORTO.

Entute 2374 leteroj pritraktis reformojn.

a) 2010 postulas la forigon de la direkteca akuzativa *u*. (Inter tiuj postulantoj estas 17 Germanoj, 419 Francoj, 681 Angloj, 214 Belgoj, k. t. p.).

b) 2034 (kiel *b* supre ; — Inter tiuj k. t. p.)

c) 654 kiel *c* supre ;

d) 78 kiel *d* supre ;

e) 51 kiel *e* supre ; k. t. p.

6^o Post studo de la ĝenerala raporto, la Esperanta Akademio, decidu kaj dissendu al ĉiu nacia ligo kaj al ĉiu Esp. ĵurnalo *ĉirkuleron sciigantan kiaj reformoj estos oficiale kaj devige enkondukataj de la 1^a de Januaro 19...*

* * *

Jen do, en kelkaj vortoj, niaj proponoj por ĝenerala interkonsento. Tamen, ni nun ankoraŭ ekzameni kelkajn eblajn kritikojn.

A. — Oni jam al ni diris : Se iam la Lingva Komitato kaj Akademio nur konsistus el.... Idistoj aŭ Ilistoj, kia danĝero por nia Esperanto !

Ni trankviliĝu. Se iam la tuta Esperantistaro estus kontenta esti regata de Idistoj, tio estus eble signo de la tempo, eble tempo de gravaj, tiam maturiĝintaj ŝanĝoj en Esperanto. Sed ankaŭ tio estus ebla, nur dank'al nia ĝenerala interkonsento : do la lingvo daurigis simple sian regulan evolucian, ĉar ankaŭ tia revoluciema Akademio devus ja regule funkciadi kiel la nuna.

B. — Ĉu, atentante nur pri la grandnombreco de la demandoj, la Akademio ne povos favori la anojn de ia speciala lingvo, klopodintaj por supereco ? Ekzemple, al la Francoj, kiuj, laŭ iu ĝenerala raporto, estus demandintaj 2000-ope fiksan vortordon en Esperanto ?

Tion ni ne devas timi. En la L. K. kaj Akademio la diverslingvaj membroj defendos la interesojn de siaj propraj lingvoj kaj ne akceptos tiel baldaŭ reformojn, donontan favoron al iu speciala nacio. Ili ĉiam respektos la principon de la internacieco. La L. K. kaj Akademio nur atentos pri ĝeneralaj Esperantaj intereso, kaj nombroj, kiel supraj, klare montros ĉu ia reformo respondas al la deziro de kiel eble plej multaj nacioj.

C. — Ĉu ĉiujare oni enkondukus aliajn reformojn ?

Ne ! La reformado devas efektiviĝi ne tro rapide : studo kaj sin-gardemo estas necesaj kondiĉoj. Okaze, pri ia grava temo, pritrakti-ta eĉ de nur tre malmultaj Esperantistoj, la Akademio per siaj cirku-leroj povos demandi la opinion de ĉiuj ligoj, laŭ la supre montrita vo-jo. Aliparte, ĉiulande oni povos en ĉiu Esperantisto jurnalo libere propagandi por varbi emulojn al ia bona ideo, kaj submeti ĝin poste al la Akademio.

Ni opinias ke ĉiukvinjare la Akademio povos konigi siajn decidojn, ĉiu novaĵo estos enkondukata nur laŭ kaj post ĉie sentata bezono.

* * *

Kaj de nun, amikoj fidelaj, ni agu ! Ke jam dum la jaro 1909^a ĉiu ligo starigu sian *Lingvan Komision* ! Ke la Akademio mem pruvu sian sanan vivadon kaj invitu ĉiun ligon kaj Esperantistan organizad-on de la mondo, partopreni en tiu grava laboro ! Ni ne atendu !

Oni tiom ofte diris ke la Esperantistaro estas grandega familio. Nu, ni montru tion. Por ke nia familio restu forta kaj fortika, preci-pe unuigita, por ke ĝi sane kresku, ni bezonas ordon, kaj fortan re-gulan organizadon. Kiam ni estos akirintaj tion, la ne-Esperantist-oj vidos, ke ni ne estas revantaj idealistoj, sed praktikaj progres-emuloj : ili venos al ni !

Kaj, malgraŭ la malgajaj asertoj de kelkaj facilanimaj malfidelu-joj, nia kara Esperanto senskue, trankvile, libere kaj fiere marŝos an-taŭen.

FRANS SWAGERS.



KURAGIGAĴOJ

(DAŬRIGO)

LETERO DE SINO ROSA JUNCK, MEMBRO DE LA LINGVA KOMITATO.

Sino Rosa Junck, kiu loĝas en Bordighera (Italujo) skribas al ni el Dresdno, kiun ŝi ne jam estis forlasinta je la fino de Oktobro. Ŝi raportas pri la progresado de Esperanto en la Saksa ĉelurbo, kie fondiĝas antaŭ nelonge la « Saksa Esperanta Instituto. » Ŝi es-primas sian bedaŭron pro la defalo de tiuj, kiujn ni iam estimis kaj amis. « Pli ol nobelecon » ŝi diras, « pli ol ordenojn aŭ rubandojn, mi ŝatas karakteron kaj fidelecon al la propra konvinko, al la kaŭzo por kiu antaŭe oni tutkore laboris kaj batalis... »

Kaj rilate al « Belga Esperantisto » :

« Por via nova jurnalo la plej sinceran bondeziron. Ĉiam, rekte

« kuraĝe, kaj ne flankiĝante ni iru al la vojo celita !

Ĝis la revido !

Kore via

ROSA JUNCK. »

Letero de Sro ĈEFEC, la konata aŭtoro de la « Esperantaj Ŝlosiloj. »

London, S. W. la 25an de Oktobro 1908.

Karaj Samideanoj,

Kun granda ĝojo eksciigos la esperantistoj en la tuta mondo ke la granda plimulto de la Belgaj samideanoj decidigis defendi kaj kon-servi per nova organo « Belga Esperantisto » la lingvon tia, kian in-struas la Fundamento de Dro Zamenhof, lingvon, kiu jam sin pruvis dum preskaŭ 28jara kritika ekproviĝo, ne nur nature eveluciebla, sed akceptebla de ĉiuj nacioj el la mondo.

Zorgu la purecon de la vortaro, por ke oni ne enkonduku unuflan-ke proponitajn novaĵojn, kiuj ŝajnas bezonataj de unu lingvo, sed absolute superfluaĵoj al tiuj de aliaj.

Memoru ke Dro Zamenhof jam skribis al Sro Borovki antaŭ mul-taj jaroj :

« Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la prak-« tiko senbezona balasto ; tiel ekzemple mi devis forjeti kelkajn « nebezonaĵojn sufiksojn. »

Evitigu, ke sin ripetu la historio !

Esperanto estas idioma multe pli perfekta ol iu el la naturaj naciaj lingvoj.

Kion do povas rajte deziri ia delegacio, elektita de la plej lertaj lingvosciencistoj de la mondo !

Kore salutas via

E. ĈEFEC.

El letero de Sro DREVES UITERDIJK, membro de la Lingva Komitato, Prezidanto de la Holanda Ligo Esperantista.

Hilversum, la 22an de Oktobro 1908.

..... Kara juna kolego, Belga Esperantisto, kies naskiĝo purigis la situacion en via lando, kore bonvena ! Kresku prospere, samtem-pe kun via frateto trans proksimaj limoj. (1) Ni ne forgesu ke ni estas ne nur najbaroj, sed plu intime ligitaj je raso, deveno, simpa-tio, lingvo k. c. Ni laboru en frata konsento sen tro sentadi la politi-kan mureton inter ni.

(1) Aludo al « Holando Pioniro. »

Vivu niaj novaj gazetoj !

Tutkore via

DREVES UTTERDIJK.

Letero de GENERALO SEBERT, de la Franca Instituto,
membro de la Lingva Komitato.

Parizo, la 2^{an} de Novembro 1908.

Estimataj Samideanoj,

Kun granda intereso mi eksciis la baldaŭan publikigadon de via
jurnalo « Belga Esperantisto. »

Decidinte la presadon de tiu nova gazeto, la Belgaj esperantistoj
certe agis prave. Ĝi provas, per eksperimento mem, kiel tion faris
jam niaj triumfintaj kongresoj, ke la tiama lingvo « Esperanto » ne
bezonas ŝanĝojn aŭ eĉ plibonigojn por plenumi la taskon de in-
ternacia lingvo vere vivanta kaj plenuita.

Mi gratulas vin pro via sindonemo pri la granda Ideo, kaj sendas
al vi ĉiuj miajn plej sincerajn bondezirojn por la sukceso de viaj
klopodoj.

Kun kora kaj amika saluto

Via

H. SEBERT.

Letero de Sro. A. GRABOWSKI, membro de la Lingvo
Komitato, kaj de la Esperanta Akademio.

Varsovio, Hoza 40, 3 XI. 1908.

Estimataj Sinjoroj,

Kun granda ĝojo mi ricevis vian sciigon pri la reorganizo de la
komitato de la Belga Ligo Esperantista kaj pri la fondo de la revuo
« Belga Esperantisto », kiuj ambaŭ nun, anstataŭ perdi tempon per
teoriaj diskutoj, dediĉos ĝin el energia disvastigado de nia tradicia
Esperanto.

Mi tre bedaŭras la foriron de la reformemuloj el nia rondo, sed
mi estas certa, ke ili ekkonos line sian eraron kaj revenos, kiel jam
faris multaj aliaj, sub la verdan Standardon.

Ankaŭ ili konvikiĝos, kiel iam antaŭe mi mem, ke nenia Esperan-
to flikita povas kontentige anstataŭi la Zamenhofan genian kreaĵon.

Mi kun plezuro remorigas al mi la tempon pasigitan somere en
Belgujo inter la gastamaj Belgaj samideanoj, kaj nun mi uzas la okaz-
on por saluti ilin kaj esprimi al la nova revuo plej koran bonvenon.

Tute via

A. GRABOWSKI.

Letero de Sro CART, prezidanto de la Franca Esperantista Societo,
membro de la Lingva Komitato kaj de la Esperantista Akademio

Parizo, la 10an de Decembro 1908.

Estimataj Sinjoroj,

Pro la unua numero de « Belga Esperantisto » mi tutkore gratulas.
Jes, nur dank'al unueco vi povas venki, nur dank al lojala, vera
unueco ; ŝajna unueco estas ne forto, sed malforto, ĉar ĝi estas nur
mensogo. Unueco per komuna lojaleco, per komuna fideleco estas la
nia, kaj pro tio ni fine venkos !

Korege kaj fidele via

TH. CART.

Letero de Sro J. BOREL, membro de la Lingva Komitato, direk-
toro de « Germana Esperantisto ».

Berlino, la 14an de Decembro 1908.

Estimataj Sinjaroj Redaktoroj !

Kun plezuro mi ricevis la unuan numeron de via bela kaj bona
« Belga Esperantisto ». En la nomo de « Germana Esperantisto » mi
tutkore esprimas al ĝi bonvenon en la Esperantista familio kaj dezir-
as ke baldaŭaj kuraĝigaj sukcesoj rekompencu viajn penadojn.

Mirinde estas ke en lando, kie dum unu tuta jaro la oficiala kaj
sola organo kontraŭbatalis Esperanton, restis ankoraŭ tiom da entu-
ziasma fervoro, tiom da energio por daŭrigi la laboron. Tio pruvas
kiom da vivforto posedas nia lingvo kaj kiel profunde ĝi jam enradik-
igis en via Belga tero. Ni kune iru, mano en mano al nia komuna
celo !

Samideane via

J. BOREL.

Letero de Sro. John ELLIS, membro de la Lingva
Komitato kaj de la Esperantista Akademio.

Keighley (Angl.) 14. XII. '08.

Estimataj Samideanoj,

Via programo estas admirinda, mi scias ke vi ĝin plenumos, ĉar
mi okulvidis vian energion, fervoron kaj kompetentecon.

For la duboj ŝanĝeliĝoj ! Ĉu dubi en la momento de triumfo ? Ĉu
malkuraĝiĝi pro manpleno da malkontentuloj ? Se mi konas la Bel-
gajn — kaj ni spertis ilian gastamecon kaj amikecon — ili ne for-
gesos ke la jam atingita sukceso de Esperanto estas la efektiva lev-
ilo por ĝia pli granda sukceso en la estonteco. « Nenio sukcesas, kiel

la sukceso, » diras la Amerikanoj.

Kun kora saluto

Via
John ELLIS.

Letero de Sro J. C. O'CONNOR, membro de la Lingva Komitato.
Centra Angla Esperantejo, 17, S. Stephens Sor. Baryswater, London, 17. XII. 08.

Karaj kaj Estimindaj Samidaenoj,

Mi tre gratulas vin pro via vere bonega gazeto. Mi estas tute certa, ke « Belga Esperantisto » estos fidela defendanto de la vereco kaj justeco, kaj ankaŭ de tiuj ĉi grandaj principoj, kiujn ni estas ricevintaj el la manoj de nia Majstro Dro Zamenhof.

Korege via
J. C. O'CONNOR
Ph. D. M. A.



Belga Ligo Esperantista

RAPORTO

pri la komitata kunveno, okazinta en Bruselo, je Dimanĉo,
la 18^a de Oktobro 1908, en salono de la
« Café des trois Suisses. »

So **Van der Biest-Andelhof**, vicprezidanto, malfermas la kunsidon je la 10 1/2^a matene.

Ĉeestas: Soj L. Champy (Antverpeno), Leŭtenanto Speybrouck, anstataŭanta S^{na} Komandanton Duverdlyn (Bruĝo), Abato Richardson (Bruselo), Fr. Swagers kaj Oscar Van Schoor (Antverpeno), delegitoj de la ĝenerala kunveno:

Soj Van der Biest-Andelhof kaj Ad. Finet (Antverpena Grupo Esperantista) — J. B. Istace kaj Fr. Schoofs (Verda Stelo, Antverpeno), — Havermans kaj Goossens, anstataŭanta S^{na} Delahaye (Berchemo Grupo Esperantista), — J. Clerbaut (Boom'a Grupo Esperantista), F^{ino} B. Ledène kaj S^o A. J. Witteryck (Bruĝa Grupo Esperantista), — F^o A. Guillaume kaj S^o Oct. Chalon (Pioniro, Bruselo) — K. Schriewer (Amikejo, Neŭtra Moresnet'o) kaj Pol Stappers (Excelsior, S^{ta} Trudo), S^o J. Coox, kasisto de la ligo.

Senkulpigis: Soj Delvaux kaj Heyne (Karlореĝa Grupo Esperantista).

La komitato akceptas la eksigon de la grupoj de Laeken, Spa, Verviers kaj Ixelles. Ĝi decidas jese pri la aliĝo de la grupoj « Excelsior » kaj « Stelo matena » el S^{ta} Trudo. La deziron pri aliĝo de la grupo de Nivelles ĝi ne povas plenumi, ĉar tiu grupo ne aldonis al sia peto sian regularon kaj la nomaron de siaj membroj.

La prezidanto legas raporton pri la lasta ĝenerala kunveno, redaktitan de S^o Jos. Jamin, eks-sekretario de la Ligo. La kunsidantaro konstatas ke tiu ĉi raporto estas nek sufiĉe plena, nek sufiĉe preciza, kaj decidas ke la hodiaŭ elektonta sekretario redaktos novan protokolon, kiun li prezentos okaze de la ĝenerala kunveno de 1909.

Sroj Komandanto Lemaire, eks-prezidanto, kaj Jamin, eks-sekretario, skribis al la komitato leteron, per kiu ili kontestas al ĝi la rajton pri propreco de la mono, dokumentoj kaj biblioteko de la Ligo. La ĉeestantoj konsiderante ke tiuj aferoj estas cititaj en la lasta bilanco, aprobita de la ĝenerala kunveno, decidas ke la Ligo estas la leĝa posedanto de ili. (1)

Pri la punkto « Plano de propagando » S^o Champy proponas ke la Ligo sin ageme okupu pri la enkonduko de Esperanto en la publikan instruadon.

Oni ĝenerale interkonsentas pri la de S^o Champy elmetita ideo, kiu estos ankoraŭ priparolata dum la venonta kunsido. Intertempe ĉiuj komitatanoj pripensas la plej bonajn rimedojn por solvi la demandon.

S^o Chalon opinias ke, antaŭ ol oni sin turnu al la publikaj estraroj la demando pri lingvaj reformoj devas esti solvita. La Belga Registaro ne prenos sur sin decidi kiu el la du lingvoj — la Zamenhola — aŭ tiu de la Delegacio — estas la plej taŭga por plenumi la taskon de internacia helpa lingvo. Li do proponas ke la ĉefa klopodo de la komitato celos: 1^a la ekzamenon de la reformaj proponoj, 2^a la starigadon, laŭ sistemo ĝenerale akceptota, de centra internacia organismo, kies misio estos solvi la suprediritan demandon, kaj fiksi definitive la internacian helpan lingvon. Laŭ la parolanto, la « Lingva komitato » ne havas sufiĉan aŭtoritaton por decidi ion ajn je l' nomo de la tuta Esperantistaro.

La Prezidanto rememorigas la sekvantan deklaron, proponitan de S^o Swagers dum la lasta ĝenerala kunveno, kaj akceptitan de grava plimulto:

« La Belgaj Esperantistoj, aŭdinte la opinion de diversaj parolin-
« toj, rilate al reformoj pri Esperanto, deklaras ke verki kaj en-
« konduki tiujn reformojn estas la tasko de la kompetentaj aŭtorita-
« toj, nome la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio, en kiuj ili ha-
« vas plenan fidon, — kaj decidas daŭrigi ageme la propagandon
« por la Zamenhola Esperanto, kies evolucio fiksis laŭdiritaj aŭtor-

(1) Kelkajn tagojn poste la nova estraro ricevis ĉion.

« itatoj. »

Per 15 voĉdonoj kontraŭ 2 la ĉeestantaro decidas ke ne povas esti la tasko de la Ligo sin okupi pri lingvaj demandoj.

S^o Fr. Swagers opinias ke la reforma demando devas esti afero nepre privata. Sed nenio malhelpas ke la Ligo sin interesu pri ĝi, starigante specialan komision, kiu kolektus la proponojn pri dezirindaj reformoj, kiujn la esperantistoj estus sendintaj al ĝi. La Komisiono ordigus la ricevitaĵajn proponojn kaj transigus ilin, sen komentario, al la Lingva Komitato.

La ideo de **S^o Swagers** estas favore akceptata. La parolanto intencas pritrakti ĝin detale en artikolo, kiun li sendos al la novanoncita revuo « Belga Esperantisto. »

Pri la reforma demando **S^o Havermans** rimarkigas ke, se oni riproĉas al la lingvo « Ido » multe da malperfektigaĵoj pri gramatiko kaj vortformado, ankaŭ multe da vortradikoj estas malbone elektitaj ; li pravas tion per kelkaj ekzemploj.

S^o Witteryck legas leteron de **S^o Boirac** rilatantan al la lastaj okazintaĵoj kiuj agitis la esperantistaron. Pri kelkaj punktoj de tiu letero **S^o Coox** protestas.

La **Prezidanto**, rimarkiginte, ke oni jam tro longtempe preparolis punktojn ne cititajn sur la tagordo, fermas la diskutadon.

Ĉar **S^o Jamin** skribis al la komitato ke de nun la gravaj monhelpoj, donitaj al **S^o K^o Lemaire** de Sroj Ern. Solvay kaj aliaj ne plu estas donataj al la Ligo por propagandi Esperanton (ili nun estas uzataj por ĝin kontraŭbatali !) **S^o Champy**, por provizi la kason de la Ligo proponas ke la diversaj grupoj pagu al ĝi ĉiujaran kotizadon, po:

5 frankoj por	malpli ol	50 membroj,
10 » »	50 ĝis 100 »	,
15 » »	100 » 150 »	,
20 » »	150 » 200 »	, k. t. p.

La propono de **S^o Champy** estas akceptata principe ; oni decidas ke la delegitoj prezentos ĝin al siaj grupoj kaj konigos letere al la prezidanto ilian respondon.

Antaŭ ol elekti la estraron de la komitato, **S^o Chalon** sciigas ke li voĉdonis kontraŭ la tagordo prezentita dum la lasta ĝenerala kunveno ; konsekvence, li voĉdonos nur por kandidato kiu malaprobas tiun tagordon kaj intencas klopodi por solvi la reforman demandon kun helpo de nova centra internacia organismo.

Rilate al la prezidanteco **Sroj Champy** kaj **Van der Biest** proponas ĝin lasi provizore ne okupata, por prezenti ĝin okaze al influriĉa persono, kiu povus doni al la Ligo grandan apogon. La plimulto de la ĉeestantoj opinias laŭ kontraŭa senco kaj proponas la kandidatecon de **S^o Van der Biest**.

Tiu ĉi deklaras ke, se li akceptas la prezidantecan, lia ĉefa zorgo estos respektigi la tagordon voĉdonitan dum la ĝenerala kunveno de la 20^a de Septembro, kaj rememorigitan ĉi supre.

Ĉar neniu el la ĉeestantoj deziras akcepti la funkcion de prezidanto laŭ la programo de **S^o Chalon**, li mem prezentas sian kandidatecon por la prezidanteco.

Rilate al la kandidateco de **S^o Witteryck**, al kiu vicprezidanteco estas prezentata, **S^o Chalon** diras ke li ne voĉdonos por tiu kandidato, ĉar tiu ĉi subskribis la bataleman tagordon legitan dum la lasta ĝenerala kunveno.

La rezultato de la voĉdono estas la jena : Prezidanto : **S^o Van der Biest-Andelhof** ; **S^o Chalon** ricevas 2 voĉdonojn.

Vicprezidantoj : **Sroj A. J. Witteryck** kaj **Abato Richardson**. Ĝenerala sekretario : **S^o Léon Champy**.

Kasisto (ĉar **S^o Coox** eksiĝis) : **S^o Osc. Van Schoor**.

S^o Van der Biest dankas la ĉeestantojn pro la honoro, kiun ili faras al li, kaj promesas sian tutan sindonon al la Ligo kaj Esperanto.

S^o Richardson, akceptante la vicprezidantecan, dankas siavice siajn kolegojn. La tuta agemeco de la Ligo, li diras, devas esti dediĉata al la propagando de la Zamenhofa lingvo. Ni riparu la tempon perditan pro longaj senefikaj diskutadoj pri reformaj, kiuj nur okazigis malfidon kaj malordon en niaj vicoj. Ni diskonigu kaj rekomendu la baldaŭ aperontan revuon « Belga Esperantisto » kaj ni kunlaboru al ĝi, por igi ĝin interesa. Se kelkaj grupoj forlasis nin, kun ĝojo ni konstatas ke aliaj estas pretaj por ilin anstataŭi ; post nelonge nia komitato estos pli multnombra ol antaŭe.

La parolanto finis, rememorigante la kernon, la internan ideon de Esperanto, kiu estas tiu de la internacia frateco.

Li estas entuziasme aplaŭdata.

S^o O. Van Schoor anoncas ke li publikigos je la komenco de la nova jaro adresaron de la Belgaj Esperantistoj por 1909, kaj petis la ĉeestantojn ke ili bonvolu sendi al li ĉiajn sciigojn rilatantajn ne nur al siaj grupoj sed ankaŭ al la izolitaj Esperantistoj de sia regiono.

S^o Van der Biest sciigas pri la baldaŭa apero de la revuo « Belga Esperantisto » redaktota de **Sroj L. Champy**, **Fr. Schoofs**, **Jer. Van Laere**, **O. Van Schoor** kaj li mem. Li varme rekomendas la novan organon, kiu celos la propagandon de la Zamenhofa Esperanto, klopodos por interesi sian legantaron per la bona elekto de sia enhavo kaj estos bonega ligilo inter la Belgaj grupoj.

S^o Schriewer vokas la atenton de la kunsidantaro sur la Esperantistajn festojn organizotajn en Amikejo. La unua okazos je la 26^a de Decembro. Li esperas ke multaj samideanoj respondos lian alvokon.

La kunsido estas fermata je la 1^a posttagmeze.

La ĝenerala sekretario,
Léon CHAMPY.

Valora Aliĝo.

Ni publikigas kun granda plezuro la ĉisuban leteron, per kiu Sro Dro V. Desguin, Skabeno de la Publika Instruado f. f. Urbestro de Antverpeno, akceptas la honoran membrecon de la komitato de la Belga Ligo Esperantista.

La tuta Belga Esperantistaro konas la multnombrajn atestojn pri simpatio kaj apogo kiujn nia movado ricevis de la Antverpena urbestro: la letero de la unua magistrato el la granda komerca metropolo estas nova pruvo pri tio. « Belga Esperantisto » estas feliĉa utiligi la nunan okazon por prezenti sian fervoran dankon al la Antverpena urba konsilantaro kaj speciale al ĝia eminenta kaj lerta estro, nia nova honora komitatano Dro V. Desguin:

Antverpeno, la 25^{an} de Decembro 1908. (1)

Sinjoroj,

Mi bone ricevis vian atablan leteron de la 23^a de la nuna monato.

Vi scias, Sinjoroj, ke mi ĉiam atentis kun granda intereso pri viaj penadoj por la diskonigo kaj la disvolvigo de internacia lingvo. Tio estas diri ke mi tre volonte akceptas la titolon de honora komitano kiun vi bonvolis prezenti al mi.

Ricevu, Sinjoroj, la certigon de miaj atestimaj sentoj.

La Skabeno, ff. Urbestro,
Victor DESGUIN.

Al Sinjoroj Prezidanto kaj
Membroj de la Belga Ligo Esperantista.

(1) El franca lingvo tradukita.



Malnova Rakonteto.

La ensorcista Korvo (Kredinda historio).

Nikolao O... havis edzinon, tre amindan sed malsaneman, kaj malsovaĝin korvon, kiun li instruis paroli.

Tial ke la birdo tre ofte aŭdis la malfeliĉan virinon diri al ŝia edzo: Ho, Nikolao, mi estas tre malsana! — ĝi estis memorinta tiun ĉi frazon, kiun ĝi ripetis ĉiomomente.


Oni lasadis plenan liberecon al la birdo kaj ofte okazis, ke ĝi, el la ĝardeno, forflugis sur la kampojn.

Jam alilandulo, Sinjoro B... ĉasante trairis la P... an kamparon: vidinte nenian ĉasajon, li, pro manko de plibona kaptajo, celis grandan korvon, kiu staris sur sterkamaso, kaj pafis. La birdo falis. La ĉasisto estis tuj kaptonta ĝin, kiam la korvo je plendanta voĉo ĝemis: Ho, Nikolao, mi estas tre malsana! — Estis la birdo de Nikolao O., kiu preskaŭ svenanta sed ne grave vundita, ripetis sian plej kutiman frazon. Sed tiuj vortoj en tia okazo, estis multe pli strangaj pro tio, ke la baptonomo de nia ĉasisto estas precize Nikolao. Tiu ĉi estis superstiĉulo tiel kredema pri la sorĉistoj, kiel kristano pri Dio.

Priskribi lian miregon, lian teruregon, ne estas eble. Lasinte la korvon, forgesante sian pafilon, kiu falis el liaj manoj, li plej eble rapide forkuris kaj al renkontita pasanto li naivege rakontis sian nekredeblan aventuron. Tiu pasanto, unu el la najbaroj de Nikolao O..., bone konis la parolantan korvon. Li havis nenion pli urgantan ol sciigi siajn amikojn kaj konatojn pri tiu gajiga afero. Ĉu mi devas diri la ridadojn, kiujn tio kaŭzis; la serĉadojn, kiuj atakis la malfeliĉan ĉasiston? Ĉu, precipe la honton kaj la furiozon de tiu-ĉi?

De tiu tempo, pli ol dudek jaroj pasis. Se, amiko-leganto, vi renkontus sinjoron B... mi petas vin, ne diru al li: Ho, Nikolao, mi estas tre malsana!... La kompatinda korvoĉasisto vin batus, eble vin mortigus, ĉar ĝis nun li ne ĉesis furiozadi.

E. V. HONINCKS.



Bonaj okulvitroj

Vilaĝano iam havis aferon kun la juĝistaro; li konsiliĝis kun advokato Daŭrulo kaj klarigis al li ĉiujn cirkonstancojn. La advokato petis lin ke li revenu la sekvontan semajnon.

Kiam je la fiksita tago la vilaĝano revenis, la advokato ne estis trovinta la tempon sufiĉan por esplori lian aferon.

Kaj li petis la vilaĝanon ke li revenu post unu semajno.

Kiam denove la kamparano revenis, la advokato ne jam sin estis okupinta pri lia proceso.

— Kio do mankas al mia afero? li demandis.

— Mi tute ne vidas klare en ĝi, respondis la advokato.

Tiam la ruza vilaĝano elprenis du orajn monerojn da dudek frankoj el sia poŝo, kaj prezentis ilin al la advokato dirante:

— Metu tiujn ĉi okulvitrojn, sinjoro advokato, kaj mi estas certa ke mia afero tuj aperos tre klare al vi.

Kaj tiel okazis!

El la kalkulo leciono

Instaŭisto : Domo havas kvar ŝtuparojn, ĉiu ŝtuparo dekdu ŝtupojn. Kiom da ŝtupoj mi do estas suprenironta de la vestiblo ĝis la subtegmento ?

Lernanto : Ĉiujn !

(Spritulo)

Por esti belulino

virino devas almenaŭ posedi:

- 3 blankaĵojn : la haŭto, la dentoj, la manoj.
- 3 nigraĵojn : la okuloj, la brovoj, la palpreboj.
- 3 ruĝaĵojn : la lipoj, la vangoj, la ungoj.
- 3 longaĵojn : la kapo, la haroj, la manoj.
- 3 larĝaĵojn : la brusto, la frunto, la brovo.
- 3 mallongaĵojn : la dentoj, la oreloj kaj... la lango.

(Monde esperantiste).



Diversaj informoj

Internacia Esperantista Psikistaro. — Oni antaŭ nelonge fondis internacian Unuiĝon por psikista studado per Esperanto, pri Spiritismo, Telepatio, Magnetismo, Hipnotismo, k. t. p. Kotizajo 1 sm. jare minimume. Por aliĝi oni bonvole sendi nomon, adreson, monon kaj fotografajon al la Sekretario *A. Stas*, St. Antoniusstraat, 25, Antwerpen.

Internacia Esperantista Farmacia Asocio. — Laŭ decido de la Esperantistaj farmaciistoj kunvenintaj dum la kongreso en Dresdeno, oni fondis « Internacian Esperantistan farmacian asocion. »

La unua konveno okazos dum la kongreso en Barcelono.

La ĉiujara kotizajo estas minimume 1 franko (o. 4 sm.) Tuj kiam la anaro estos sufiĉe multnombra, la asocio eldonos monatitan farmacian revuon, kaj la ĉiujara kotizajo estos minimume 5 frankoj (2 sm.)

Ĉiu Esperantista farmaciisto estas petata sendi al la fakaj jurnalaj de sia lando artikolon pri la nova asocio.

Por sciigoj kaj aliĝoj oni sin turnu al la sekretario *Oscar Van Schoor*, farmaciisto, 20, Vondelstraat, Antwerpen.

DEZIRAS KORESPONDI :

Sro Gabriel Alomar, Palma de Mallorca, Hispanujo. (Ilustritaj poŝtkartoj).

Sro E. O. Sauberlich, Paulstr. 12, 1 p., Dresden (id).

Sro François Chaine, mairie d'Avignon-Vaucluse, France (id)



BELGA KRONIKO.

ANTVERPENO. Antverpena Grupo Esperantista. — Estas vera plezuro konstati la ĉiam kreskantan progresadon de tiu grupo, la plej malnova de la lando. La virinaj kursoj, instruataj sub la lerta direkto de S^{ino} Claessens kaj F^{ino} Eugenie Gunzburg en la duagrada lernejo n^o 2^a por junulinoj, kunigas grandan nombron da ĉeestantinoj. La kunvenoj en la *Taverne Royale*, ankaŭ estas ĉeestataj de multe da anoj — sinjorinoj kaj sinjoroj. S^o V. Claessens, tie instruas sukcesplene Esperanton al la komenculoj ; post la instruado la novuloj kaj la veteranoj ĉeestas la saman kunsidon. Tiam oni faras legadojn kaj paroladojn, kaj poste komencas ĝenerala diskutado pri temo antaŭe difinita. Fine, oni deklamas, oni kantas ; ĉiusemajne oni lernas novan kanton. La grupanoj jam posedas rimarkindan repertuaron.

Esperanto en la Antverpeno Grupo estas instruata laŭ la Gouin'a metodo, per la bonega lernolibro « la Ĉiutaga Vivo » de Soj Swagers kaj Finet. La tri geprofesoroj posedas la ateston pri kapableco, aljuĝita de la Belga Ligo Esperantista.

Verda Stelo. Avizo. De nun la ĉiusemajnoj kunvenoj okazas ĉiumerkrede, je la 8 1/2^a vespere, en speciala salono de la kafejo « Zomerhof » Matenkrepuskoplac n^o 32^a.

BERCHEM. La Berchem'a Grupo Esperantista inaŭguris siajn agadojn la 16^{an} d. Novembro lasta per belega parolado, ilandralingve farita de nia vigla amiko, S^o Advokato Van Dieren el Loveno. La loka estraro bonvole estis konsentinta pri la uzado de la granda salono de la komunuma hotelo. La parolado kunigis multnombrian aŭdantaron kaj la oratoro ricevis sukceson, tiel entusiasman kiel bone merititan.

Ekzistas en Berchemo du kursoj : unu por la Ruĝ-krucanoj, instruata de nia kunlaboranto S^o Jer. Van Laere kaj unu por la membroj de la grupo, instruata de S^o A. Havermans, prezidanto.

BRUSELO. Pioniro. — Nia bona amiko kaj sindona kunredaktoro, S^o Van der Biest-Andelhof, legis la 25^{an} de Novembro en la grupo « Pioniro » sian Esperantan tradukon de « Vorstenplicht »

thesis in één bedrijf door Nestor de Tière. » (Devo de Reĝo, unuakta tezo de Nestor de Tière (1)). S^o Van der Biest ricevis bonemerititan sukceson kaj koran akcepton, pri kiu samtempe ĝuis la verkisto de ĉi tiu kroniko, kiu kune ĉeestis la kunvenon.

Instituto S^{ta} Ludoviko. — Kelkaj studentoj starigis en la Instituto S^{ta} Ludoviko novan grupon, kiun ili nomis « La Zamenhof. » La komitato de la juna societo estas kunmetita jene: *Honora Prezidanto*, D^o Zamenhof; *Prezidanto*, S^o Abato Richardson; *Vicprezidanto*, S^o K. de Preter; *Sekretario*, S^o P. de Bruyne; *Kasisto*, S^o L. Grégoir. La grupo petos post nelonge sian aliĝon al la Belga Ligo Esperantista.

Estas bona aŭguro por nia movado vi iom post iom ke la junularo eniras niajn vicojn, tial la fondo de la « Zamenhof » estas speciale agrabla al ni. Koran bonvenon!

GENTO. — Esperanta kurso estas malfermita en Gento la 3^{an} de Decembro en la societo « Dieu et Patrie. » La instruanto estas nia sindona amiko S^o M. Sebruyens-Vromant, la kurso estas ĉeestata de 20 lernantoj.

Ni esperu pri la baldaŭa starigo de fervora grupo en Gento, kie ĝis nun oni sin montris senatenta pri la Esperantista movado.

MEÛLENO. — La parolado de S^o Abato Richardson, kiun ni anoncis en nia lasta numero, perfekte sukcesis. Ĝi okazis la 10^{an} de Decembro en la festa ĉambrego de la malgranda Seminario, en la ĉeesto de Lia Kardinala Moŝto S^o Mercier, ĉefepiskopo, de la profesoroj de ambaŭ seminarioj, de multo da studentoj kaj de kelkaj elektitaj laikaj personoj. La oratoro faris grandan impreson kaj ricevis la tutkorajn gratulojn de Lia Kardinala Moŝto.

La eminenta prelato invitis S^{on} Richardson ripeti lian paroladon dum la nuna monato por la studentoj de la Granda Seminario, kiuj pro malhelpo, ne povis aŭskulti la parolinton la 10^{an} de Decembro.

NEŬTRA MORESNET'O. Amikejo. — La festo de la 27^a de Decembro, organizita de la grupoj « Amikejo » brile sukcesis kaj kunigis multnombrian ĉeestantaron. Pro manko de loko ni ne povas utiligi pri tiu festo la korespondajon, senditan al ni el Aĥeno. Ni priparolos ĝin en nia Februara numero.

VERVIERS. (Korespondajo de S^o Parotte). La **Esperantista Grupo** fondita la 20^{an} de Oktobro de 17 eksigintaj membraj de la [reformema] « Esperantista Societo, » kalkulis je la fino de la nuna jaro proksimume 40 anojn.

La mardaj kunvenoj, okazantaj je la 8^a vespere, tute en Esperanto, kunigas ĉiusemajne 20-25 ĉeestantojn (sinjorinojn kaj sinjorojn). Ĉiumerkrede, je la 5^a ptm. kunvenas dek-kvino da fraŭlinoj, por

ĉeesti la perfektigadan kurson, direktatan de gekomitatanoj. Plie, la Prezidanto instruas ĉiulunde je la 8^a vespere, ĉe la societo de l'oficistoj de Verviers « l'Aide mutuelle. »

La anoj de l'E. G. partoprenis multnombren en la festo okazinta la 27^{an} de Decembro en Neŭtra-Moresnet'o (Amikejo).

Ĉu ni ĉi tie aldonos ke la juna societo ricevis antaŭ nelonge tre honorigan viziton? La granda S^{ta} Nikolao, dum Sia ĉiujara rondiro tra la bona urbo Verviers ne volis preterlasi la okazon por gratuli la grupon pro ĝia fideleco al Esperanto. Tiel oficiale kiel ne atendite, dum gajege memorinda kunsido, Li bonvolis akompani per kelkaj paroloj — kompreneble en la plej bona Esperanto, — la malavaran disdonon de l'enhavo de Sia profunda dorskorbo.

Oni nur povas bedaŭri ke Lia Sanktula Moŝto, verŝajne pro vere tro ĉiela humileco, ne volis akcepti la honoran membrecon, kiun ia entuziasma amiko, dankeme prezentis al Li.

Chronique Belge.

Belgische Kronijk.

ANVFRS. Antverpena Grupo Esperantista. — C'est un vrai plaisir que de constater le progrès toujours croissant de ce groupe, le plus ancien du pays. Les cours pour dames, donnés sous la direction capable de M^{me} Claessens et de M^{lle} Eugénie Gunzburg, à l'École moyenne n^o 2 pour jeunes filles, réunissent un grand nombre d'auditrices. Les séances de la *Taverne Royale* sont également fréquentées par un grand nombre de membres assidus, dames et messieurs. M. V. Claessens y enseigne avec le plus grand succès l'Esperanto aux commençants; après la leçon les nouveaux et les vétérans assistent à la même séance. On y fait des lectures et des conférences, après quoi commence une discussion générale sur un sujet indiqué d'avance. Finalement on déclame, on chante; chaque semaine on apprend un nouveau chant. Les membres du groupe possèdent déjà tout un répertoire.

L'enseignement de l'Esperanto est donné d'après la méthode Gouin, au moyen de l'excellent manuel « La Ĉiutaga Vivo » de

ANTWERPEN. Antverpena Grupo Esperantista. — In deze groep, de oudste van het land, is het een waar genoegeden voortdurenden vooruitgang te bestatigen. De leergangen voor dames, die onder de bekwaame leiding van Mevr. Claessens en Mej. Eugénie Gunzburg in de middelbare meisjesschool n^o 2 gegeven worden, verenigen een groot getal toehoorders. De bijeenkomsten in de *Taverne Royale* worden eveneens zeer ijverig en talrijk bijgewoond. De heer V. Claessens geeft er met den grootsten bijval onderricht aan de beginnenden; na de les wonen nieuwelingen en ouderen dezelfde zitting bij. Er worden lezingen en spreekbeurten gehouden alsook een algemeene bespreking over een te voren opgegeven onderwerp. Ten slotte wordt gedeclameerd en gezongen; wekelijks wordt een esperantisch lied aangeleerd. De leden der groep hebben zich reeds een heel repertorium aangeëigend.

Het onderwijs in Esperanto wordt volgens de Gouinmethode gegeven bij middel van het voortreffelijk handboek « La Ĉiu-

(1) Aperintan en nia lasta numero.

MM. Swagers et Finet. Les trois professeurs d'Esperanto de l'A. G. E. possèdent le diplôme de capacité délivré par la Ligue Espérantiste belge.

Verda Stelo. Avis. Désormais les réunions hebdomadaires ont lieu le mercredi soir à 8 1/2 h. dans un salon special du café « Zomerhof » 32, Place de l'Aurore.

BERCHEM. Le « Berchema Grupo Esperantista » a commencé ses travaux le 16 novembre dernier par un magnifique conférence en langue néerlandaise donné par notre vaillant ami, M. l'avocat Van Dieren, de Louvain. L'autorité locale avait bien voulu accorder l'usage de la grande salle de la maison communale. La conférence avait réuni un grand nombre d'auditeurs et l'orateur a reçu un succès aussi enthousiaste que bien mérité.

Il existe à Berchem deux cours : un pour les membres de la Croix-Rouge, donné par notre collaborateur, M. Jér. Van Laere, et un autre pour les membres du groupe, donné par M. A. Havermans, président.

